


Vintro
1997

(1)

januaro
februaro
marto

Senlime

Oficiala informilo de la komitatanoj al la membraro de
Esperanto-Asocio en la Eŭregiono Mozo-Rejno



kaj

Verviersa Esperanto - Grupo

PERIODA^O
PERIODIQUE

Responsa eldonanto / Editeur responsable:

J.- M. Jacques, pl. Verte 23 bte 3, B - 4800 Verviers
(xx-32-87-330292 : jmjsenlime@tornado.be <http://www.tornado.be/~jmjsenlime>

Informations en français / Informoj en la franca:

(xx-32-87-330292 : jmjsenlime@tornado.be
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3, B-4800 VERVIERS

Kiel informiĝi
pri Senlime?

Informaties in het nederlands / Informoj en la nederlanda:

(xx-31-4330-62015
T. Sinno, In 't Oord 45, NL-6291 VN VAALS

Informationen auf deutsch / Informoj en la germana:

(xx-49-2403-64041
U. J. Moritz, Im Römerfeld 44, D-52249 ESCHWEILER

Belgio 370 BEF

Konto n-ro: **000-0245571-64**
de **Esperanto-Grupo**, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS

Kiel kotizi
al Senlime?

Nederlanda 20 NLG

Konto n-ro: **5789437**
de **Marnoland-grupo** (hr. n.g.m. Hoen), NL-6181 BG ELSLOO

Germanio 18 DEM

Konto n-ro: **663201** bankkodo **390 500 00**
de **Senlime** (Monika Hogen) Im Pesch 20, D-52134 HERZOGENRATH

N-B:

- la membro-kotizo por Senlime koncernas la civilan jaron
- la kotizoj estas nepre pagendaj antaŭ la 31-a de januaro
- la paganto klare indiku la celon de la pago, ekzemple:
membro-kotizo Senlime 1997 por S-ro XXXXXXXX
- nur niaj (regule) kotizintaj membroj ĝuas rabaton okaze de
Trilanda Renkontiĝo kaj abonon al tiu-ĉi informilo.

Eldonis *Senlime* kaj Verviersa Esperanto - Grupo

PROTOKOLO PRI LA ĜENERALA ASEMBLEO OKAZINTA en HEERLEN, la 29an de septembro 1996

prezide de Uwe Joachim MORITZ
kunvoke de Trude SINNO, la 25an de aŭgusto 1996
kun jena TAGORDO:

1. Aprobo de la protokolo pri la antaŭa Ĝenerala Asembleo en Stokkem
2. Raporto pri la agado de la komitato en 1996
3. Diversaĵoj

Ĉeestas aŭ estas reprezentataj ĉe la asembleo: gesinjoroj (komitatanoj)

1. Jan BOVENDEERD
2. Marcel DELFORGE
3. Klaus HOGEN
4. Jean-Marie JACQUES
5. Heinrich LENTZEN
6. Uwe Joachim MORITZ
7. Trude SINNO
8. Anneliese SOUREN
kaj 18 ordinaraj membroj.

Resumo de la debatoj kaj decidoj:

- 1) La protokolo pri la antaŭa Ĝenerala Asembleo en Stokkem aperis en la informilo de *Senlime* (aŭtuno 1996-4).
- 2) Skribita raporto pri la agado de la komitato en 1996 estas disdonita kaj komentita de U.J.MORITZ
- 3) Diversaj rimarkoj kaj proponoj estas faritaj:
 - Financa raporto kaj buĝeto estos prezentitaj nur dum la printempa Ĝenerala Asembleo de *Senlime*.
 - S-ro MORITZ rememorigas pri la ekzisto de faldfolio pri *Senlime*, havebla ĉe la «landaj sekretarioj».
 - S-ro MORITZ informas pri la sekvontaj Trilandaj Renkontiĝoj:
27an de aprilo 1997 en Akeno (invitilo disdonita)
28an de septembro 1997 en Lieĝo (Grivegree): organizos kaj informos D. DUPONT.
 - S-ino BOSSE-SIBBEL kaj S-ro SLUIJTMAN pagis sian kotizon sed ne ricevas la informilon.
 - pri instruado al komencantoj: la lokaj grupoj organizu kursojn (tio ne estas celo de *Senlime*) sed ni volonte informus nian membraron pere de nia perioda informilo.

Ankaŭ +ajnas, ke estus interese organizi kursojn en aliaj urboj ol kutime.

La prezidanto
U. J. Moritz

La protokolinto
J.-M. Jacques
(Daŭrigo paĝo 3)

(Daŭrigo de la paĝo 2)

Aneksa:

Raporto pri la agado de la komitato dum la jaro 1996

1. Trilandaj Renkontiĝoj

Okazis unuan fojon Trilanda Renkontiĝo en la flandra parto de nia regiono. Ĝin realigis - sukcesplene - Jan Bovendeerd la 12-an de majo 1996 en Stokkem. La nuna estas la dua renkontiĝo ĉi-jara. - Jam komenciĝis la preparoj por la du sekvantaj renkontiĝoj: la 27-an de aprilo, en Akeno, ni traktos la temon "Esencaj aspektoj de la islama mondo" kaj vizitos la Bial-moskeon. La invitojn vi jam nun trovas ĉi-tie. La postan renkontiĝon gastigos la Esperanto-klubo de Lieĝo. La daton, precizan adreson kaj temon la komitato komunikos laŭeble frue.

2. Ĝeneralaj Asembleoj

La Asembleo en Stokkem aprobis la agad- kaj financraportojn de la komitato.

3. Komitataj kunsidoj

Dum 1996, la komitato kunsidis ĝis nun kvarfoje en Herzogenrath (21.01 kaj 25.08) kaj Vaals (17.03 kaj 02.06), kaj la kvina kunsido okazos la 27.10 en Kettenis.

4. Eldonaĵoj

La *Senlime*-informilo aperos kvarfoje ĉiujare kaj enhavos la (eventuale dulingvajn) programojn de la lokaj kluboj kaj aliajn interesaĵojn por kaj pri nia trilanda regiono.

5. Ekstera agado

En la "Interreto", sub la adreso de Jean-Marie Jacques, estas legeblaj informoj pri nia asocio kaj pri esperanto.

6. Financoj

Por ke la administrado funkcii fidinde kaj ne kaŭzu kromajn kostojn, necesas ke ĉiu membro pagu sian kotizon nepre antaŭ la 31-a de januaro de ĉiu jaro al la respektiva landa kasisto, t.e. al s-ro Demarche, s-ro Hoen aŭ s-ro Hogen. La kontonumeroj kaj la kotizosumoj aperas en ĉiu eldono de nia informilo. Ĉiu paganto klare indiku la celon de pago, ekzemple: *membrokotizo "Senlime" 1997 por (nomo de la membro[j])*.

La centra kasisto prezentos al vi skizitan buĝeton koncerne la jaron 1997.

Nome de la komitato,

U. J. Moritz.

Protokolo pri la kunsido de la estra komitato la 27-an de oktobro 1996 en Kettenis (14-a ĝis 17.30-a horo).

Ĉeestis:

S-roj Wolfgang BIENEN, Klaus HOGEN, Jean-Marie JACQUES, Heinrich LENTZEN, Uwe Joachim MORITZ, S-inoj Trude SINNO kaj Anne-Liese SOUREN.

Senkulpiĝis:

S-roj Jan BOVENDEERD kaj Marcel DELFORGE

Prezidis:

Uwe Joachim MORITZ

1. Trilanda Renkontiĝo en Heerlen

- la TLR estis finance iom negativa («perdo» da 82,5 EKOj proksimume).

Senlime +uldas 1379,75 NLG al Marnoland-Grupo pro la organizado.

N-B: tiu +uldo reduktiĝas al 485,43 NLG pro aliaj en/elspezoj en NLG (kotizoj,...).

Tiu sumo estos transpagita en novembro.

Ni denove konfirmas nian starpunkton, ĉiam klare skribitan sur la aliĝiloj: la aliĝ-kotizo devige estas antaŭpagenda kaj neniakaze repagebla.

Plurfoje okazis, ke iu aliĝis sed ne venis (aŭ venis nur parton de la tago, k.t.p.): ĉiam strikte aplikiĝu la regulo!

- la TLR estis laŭ organiza vidpunkto pozitiva: bonaj manĝo kaj ejo,... sed prelego iom teda (projekciilo ne vere necesis kaj

tro multekostis: fotokopioj konserveblaj estus pli bonvenaj.

- relative malmulte da Nederlandanoj kaj precipe malmulte da Germanoj ĉeestis!

- denove preskaŭ ne estis reago de la gazetaro!

2. Trilanda Renkontiĝo en Akeno

- Aliĝiloj estis transdonitaj al la ĉeestantaj membroj en Heerlen. Aliaj sendis H. LENTZEN (el Belgio por +pari monon).

Ni tute ne plu informos tiujn, kiuj ne estas membroj de *Senlime* kaj ne partoprenis dum la 4 lastaj TLR.

- Prelegonton ni ĝis nun ne trovis, sed Trude SINNO eksciis pri islama esperantista Pakistano nun loĝanta en Brescia (Italujo), kiu eldonis islamajn kajerojn,... *i kontaktos lin.

- Klaus HOGEN tuj informu la esperantistajn gazetojn per alloga teksto.

3. Trilanda Renkontiĝo en Lieĝo

J.-M. JACQUES skribu aŭ telefonu al D. DUPONT por havi skriban proponon pri tiu TLR (ĝin ni unuope pristudos antaŭ la sekvanta Komitat-kunveno en Verviers, al kiu D. DUPONT tutkore estas invitita!).

Laŭeble informu nin (provizora programo/aliĝilo) antaŭ la jarfino (minimume: dato, loko, kaj skiza programo devus esti anoncita dum Akena-TLR).

4. Nepagintaj membroj kaj *Senlime*-buĝeto por 1997

H. LENTZEN cirkulere skribu al la ne-pagintaj membroj por peti kotizojn 1996 kaj 1997.

Klaus HOGEN prezentu buĝeton de la asocio por 1997 dum la sekvanta komitat-kunveno (ni ja bezonas scii kiom

ni ricevos, kiom ni certe elspezos, kio estos nia «rezervo», k.t.p. - krome la prezento de buĝeto estas leĝa devo por asocio sen profita celo...).

5. Kunordigado de la agadoj de la grupoj

En Nederlando, listo de esperanto-prelegantoj disponeblas: T. SINNO petu la liston.

La 8an aŭ la 15an de junio, *Senlime* proponos unutagan kunvenon en Botrange (B): vizito de la naturcentro, promenado en la ĉirkaŭa arbaro aŭ marĉo,...

6. Ekstermovada varbado de novaj membroj

1. peti «Esperanto»-tulipojn ĉe normala florvendisto, haveblaj ĉe firmao Frans ROOZEN, Vogelenzang (NL). Kulturisto esperantista: J. PRANGER, Schorweg 102, Breezand (NL).

2. Ni preparas komunan informfolion kun demandaro por disdoni en butikoj, bibliotekoj, surstrate,...

3. Heerlen festos la 2000-an datrevenon de sia naskiĝo en aprilo 1997. 125 asocioj kunlaboros. T. SINNO informiĝu nome de *Senlime* ĉe tiu urbo por ricevi la programon.

7. Malampleksaj ekspozicioj anstataŭ la Matriĥta?

Ĉu budo pri esperanto kaj disdono de inform-folioj ekz-e en la «Trilanda punkto»?

La protokolinto,
J.-M. Jacques

E S enlime p e r a n t o

Celante plifortigi la interpopolan interkompreniĝon helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la Eùregiono Mozo-Rejno, **Senlime** ĉi-tie publikigos agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eùregiono.

Ĝi **laùeble** enhavos la programojn de la lokaj grupoj. Tial tiuj-ĉi devus atingi min plej malfrue la 15an de la monatoj

- decembro por la N-ro 1
- marto por la N-ro 2
- junio por la N-ro 3
- julio por la N-ro 4.

Tiuj esperantistaj okazontaĵoj en Eùregiono Mozo-Rejno devos esti anoncitaj en esperanto aù en nacia lingvo kaj esperanto. Tiu-ĉi paĝo ankaù aperos ĉe la "Interreto" je la adreso:

<http://www.tornado.be/~jmjsenlime/>

Inf.: J.-M. JACQUES
(xx 32 87/33.02.92
: jmjsenlime@tornado.be

Verviersa Esperanto-Grupo kalendaro 1996/97 (2)

Ma. 14/01 - 20 h. - Verviers (B):
Audition du message de
Nouvel-an du groupe
espérantiste de Bradford.
Aùskultado de la novjara
mesaĝo el la Bradforda grupo.
Inf.: J.-M. JACQUES:
(xx 32 87/33.02.92

Ma. 04/02 - 20h. - Hasselt (B)
Carnaval, voordracht door Jan
Bovendeerd.
Inf.: Marcel AERTS:
(xx 32 11/25.34.67

Ma. 04/03 - 20h. - Hasselt (B)
Video „Het Esperanto
Wereldcongres in Praag” door
Albert Claesen.
Inf.: Marcel AERTS:
(xx 32 11/25.34.67

Ma. 11/03 - 20 h. - Verviers (B):
Sujet à décider / Temo decidota
Inf.: J.-M. JACQUES:
(xx 32 87/33.02.92

Di. 27/04 - 9h30 - Aachen (D)
Rencontre des (espérantistes
des) trois pays (B - D - NL).
Trilanda renkontiĝo.
Inf.: Wolfgang BIENEN:
(xx 49 241/62350

Ma. 13/05 - 20 h. - Verviers (B)
Assemblée Générale du groupe
Ĝenerala Asembleo de la grupo
Inf.: J.-M. JACQUES:
(xx 32 87/33.02.92

Di. 08 aù 15/06 - 10h.
Première "journée de
Senlime" (ou "journée sans
frontière") au centre nature de
Botrange (B).
Unua "Senlima tago" en la
natur-centro en Botrange (B).
Inf.: Trude SINNO:

(xx 31 4330 62015
Ma. 10/06 - 20 h. - Verviers (B)
Promenade botanique dans le
parc Fabiola (rue Xhavée)
Botanika promenado en la
parko Fabiola (strato Xhavée).
Inf.: José JACOB:
(xx 32 87/22.10.79

!

Senlime kaj **V.E.G.** ne responsas pri eventualaj program-+anĝoj: prefere telefonu ĉe la menciita persono antaù ol partopreni aktivajaŝon.

Senlime et **V.E.G.** ne sont pas responsables d'éventuels changements de programme. De préférence, téléphonez à la personne indiquée avant de participer à une activité.

Natur-Centro en Botrange

En la akceptejoj, provizoraj ekspozicioj celas precizan temon, ekz-e: vintro en la "Altaj Marĉoj". Laùpete, filmoj estas videblaj en la video-salono.

En vendejeto, aĉetebblas mapoj, revuoj kaj lokaj varoj. Aliloke staras konstanta ekspozicio pri naturo, historio, geografio, tradicioj kaj loĝado, kamparokaj arbaro-kulturo. Centre ku+as reliefa mapo pri la natur-parko "Altaj Marĉoj-Eifel".

Promenadoj (gividataj aù ne) en la belega tiea regiono ĉiam eblas!

 1977
Meilleurs
voeux!

Verviersa Esperanto Grupo

Kotizoj / Cotisations

Belgoj loĝantaj en Eùregiono povas ĝiri la subajn kotizojn al la konto n°

Les belges habitant l'Eurégio peuvent virer les cotisations suivantes au compte n°

000-0245571-64

de: Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

Senlime **370 BEF**

APE 96/97 **400 BEF**

UEA 1997 **1850 BEF**

Nouvelles du Groupe Espérantiste de Verviers

Elles pourraient être meilleures...

La saison a commencé, en septembre, par une nouvelle version (en espéranto) de "Singing in the rain", réalisée - avec le succès de foule que l'on devine - à l'occasion de notre "promenade botanique" dans le parc de l'Harmonie...


Un mois plus tard: nouveau bain (de foule, cette fois) à l'occasion de la conférence sur "Internet et l'espéranto", conférence au cours de laquelle les rares courageux ont pu admirer le site consacré à l'espéranto et à *Senlime*, avec une page pour notre groupe...

Mardi 12 novembre: examens d'espéranto pour les élèves du cours de l'an passé: partie remise faute de combattant!

Décembre: alors que votre serviteur était, pour une fois, privé d'espéranto par un voyage d'étude forcé à Clermont-Ferrand (offert par son employeur!), la réunion du groupe consacrée à l'enregistrement sur cassette du traditionnel "message à Bradford" voyait venir... *un* visiteur!

Qu'à cela ne tienne: la cassette est partie, la réponse sera entendue le mardi 14 janvier à 20h...

Enfin, le président (José JACOB) s'est bien remis de sa maladie et le secrétaire (votre serviteur) a retrouvé un emploi (la direction de l'Et. d'Enseignement Spécial Secondaire de la Communauté Française à Verviers). Tout est donc pour le mieux dans le meilleur des mondes.



Verviersa Esperanto - Grupo

J.-M. Jacques, pl. Verte 23 bte 3
B-4800 VERVIERS

Senlime

Printempo
1997

(2)

aprilo
majo
junio

Senlime

Oficiala informilo de la komitatanoj al la membraro de
Esperanto-Asocio en la Eŭregiono Mozo-Rejno



kaj

Verviersa Esperanto - Grupo

PERIODA^O
PERIODIQUE

Responsa eldonanto / Editeur responsable:

J.- M. Jacques, pl. Verte 23 bte 3, B - 4800 Verviers
(xx-32-87-330292 : jmjsenlime@tornado.be <http://www.tornado.be/~jmjsenlime>

Informations en français / Informoj en la franca:

(xx-32-87-330292 : jmjsenlime@tornado.be
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3, B-4800 VERVIERS

Kiel informiĝi
pri Senlime?

Informatie in het Nederlands / Informoj en la nederlanda:

(xx-31-4330-62015
T. Sinno, In 't Oord 45, NL-6291 VN VAALS

Informationen auf deutsch / Informoj en la germana:

(xx-49-2403-64041
U. J. Moritz, Im Römerfeld 44, D-52249 ESCHWEILER

Belgio 370 BEF

Konto n-ro: **000-0245571-64**
de **Esperanto-Grupo**, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS

Kiel kotizi
al Senlime?

Nederlando 20 NLG

Konto n-ro: **5789437**
de **Marnoland-grupo** (hr. n.g.m. Hoen), NL-6181 BG ELSLOO

Germanio 18 DEM

Konto n-ro: **663201** bankkodo **390 500 00**
de **Senlime** (Monika Hogen) Im Pesch 20, D-52134 HERZOGENRATH

N-B:

- la membro-kotizo por Senlime koncernas la civilan jaron
- la kotizoj estas nepre pagendaj antaŭ la 31-a de januaro
- la paganto klare indiku la celon de la pago, ekzemple:
membro-kotizo Senlime 1997 por S-ro XXXXXXXX
- nur niaj (regule) kotizintaj membroj ĝuas rabaton okaze de
Trilanda Renkontiĝo kaj abonon al tiu-ĉi informilo.

Eldonis *Senlime* kaj Verviersa Esperanto - Grupo

PROKOKOLO PRI LA ĜENERALA ASEMBLEO OKAZINTA en HEERLEN, la 29an de septembro 1996

prezide de Uwe Joachim MORITZ
kunvoke de Trude SINNO, la 25an de aŭgusto 1996
kun jena TAGORDO:

1. Aprobo de la protokolo pri la antaŭa Ĝenerala Asembleo en Stokkem
2. Raporto pri la agado de la komitato en 1996
3. Diversaĵoj

Ĉeestas aŭ estas reprezentataj ĉe la asembleo: gesinjoroj (komitatanoj)

1. Jan BOVENDEERD
2. Marcel DELFORGE
3. Klaus HOGEN
4. Jean-Marie JACQUES
5. Heinrich LENTZEN
6. Uwe Joachim MORITZ
7. Trude SINNO
8. Anneliese SOUREN
kaj 18 ordinaraj membroj.

Resumo de la debatoj kaj decidoj:

- 1) La protokolo pri la antaŭa Ĝenerala Asembleo en Stokkem aperis en la informilo de *Senlime* (aŭtuno 1996-4).
- 2) Skribita raporto pri la agado de la komitato en 1996 estas disdonita kaj komentita de U.J.MORITZ
- 3) Diversaj rimarkoj kaj proponoj estas faritaj:
 - Financa raporto kaj buĝeto estos prezentitaj nur dum la printempa Ĝenerala Asembleo de *Senlime*.
 - S-ro MORITZ rememorigas pri la ekzisto de faldfolio pri *Senlime*, havebla ĉe la «landaj sekretarioj».
 - S-ro MORITZ informas pri la sekvontaj Trilandaj Renkontiĝoj:
27an de aprilo 1997 en Akeno (invitilo disdonita)
28an de septembro 1997 en Lieĝo (Grivegnée): organizos kaj informos D. DUPONT.
 - S-ino BOSSE-SIBBEL kaj S-ro SLUIJTMAN pagis sian kotizon sed ne ricevas la informilon.
 - pri instruado al komencantoj: la lokaj grupoj organizu kursojn (tio ne estas celo de *Senlime*) sed ni volonte informus nian membraron pere de nia perioda informilo.

Ankaŭ +ajnas, ke estus interese organizi kursojn en aliaj urboj ol kutime.

La prezidanto
U. J. Moritz

La protokolinto
J.-M. Jacques

(Daŭrigo paĝo 3)

Aneksa:

Raporto pri la agado de la komitato dum la jaro 1996

1. Trilandaj Renkontiĝoj

Okazis unuan fojon Trilanda Renkontiĝo en la flandra parto de nia regiono. Ĝin realigis - sukcesplene - Jan Bovendeerd la 12-an de majo 1996 en Stokkem. La nuna estas la dua renkontiĝo ĉi-jara. - Jam komenciĝis la preparoj por la du sekvantaj renkontiĝoj: la 27-an de aprilo, en Akeno, ni traktos la temon "Esencaj aspektoj de la islama mondo" kaj vizitos la Bial-moskeon. La invitojn vi jam nun trovas ĉi-tie. La postan renkontiĝon gastigos la Esperanto-klubo de Lieĝo. La daton, precizan adreson kaj temon la komitato komunikos laŭeble frue.

2. Ĝeneralaj Asembleoj

La Asembleo en Stokkem aprobis la agad- kaj financraportojn de la komitato.

3. Komitataj kunsidoj

Dum 1996, la komitato kunsidis ĝis nun kvarfoje en Herzogenrath (21.01 kaj 25.08) kaj Vaals (17.03 kaj 02.06), kaj la kvina kunsido okazos la 27.10 en Kettenis.

4. Eldonaĵoj

La *Senlime*-informilo aperos kvarfoje ĉiujare kaj enhavos la (eventuale dulingvajn) programojn de la lokaj kluboj kaj aliajn interesaĵojn por kaj pri nia trilanda regiono.

5. Ekstera agado

En la "Interreto", sub la adreso de Jean-Marie Jacques, estas legeblaj informoj pri nia asocio kaj pri esperanto.

6. Financoj

Por ke la administrado funkciu fidinde kaj ne kaŭzu kromajn kostojn, necesas ke ĉiu membro pagu sian kotizon nepre antaŭ la 31-a de januaro de ĉiu jaro al la respektiva landa kasisto, t.e. al s-ro Demarche, s-ro Hoen aŭ s-ro Hogen. La kontonumeroj kaj la kotizosumoj aperas en ĉiu eldono de nia informilo. Ĉiu paganto klare indiku la celon de pago, ekzemple: *membrokotizo "Senlime" 1997 por (nomo de la membro[j])*.

La centra kasisto prezentos al vi skizitan buĝeton koncerne la jaron 1997.

Nome de la komitato,

U. J. Moritz.

PROTOKOLO

PRI LA LASTA KOMITAT-
KUNSIDO OKAZINTA LA
2an de marto 1997 en Verviers

Cxeestis: S-roj Wolfgang BIENEN, Marcel DELFORGE, Klaus HOGEN, Jean-Marie JACQUES, Heinrich LENTZEN, Uwe Joachim MORITZ, S-inoj Trude SINNO kaj Anne-Liese SOUREN.

Senkulpigxis: S-ro Jan BOVENDEERD

Prezidis: Uwe Joachim MORITZ

Internet

La komitatoj cxeestis praktikan demonstiron pri la funkciado de Interreto kaj vidis, interalie, la pagxojn de *Senlime*.

Konto 1996**ENSPEZOJ**

TRANSDONO 1995	1278.16
Kotizoj de 25 membroj	358.11
TLR Stokkem	1021.22
TLR Heerlen	917.33
Donacoj	<u>135.96</u>
SUMO	3710.79

ELSPEZOJ

Administrado	398.85
Aliaj kostoj	625.58
TLR Stokkem	756.25
TLR Heerlen	999.86
REZERVO	<u>930.25</u>
SUMO	3710.79

Bugxeto 1997**ENSPEZOJ**

TLR Akeno (profito)	100.00
TLR Liegxo (profito)	100.00
40 membro-kotizoj	360.00
Donacoj; vojaĝx-kostoj,...	<u>130.00</u>
SUMO	690.00

ELSPEZOJ

Administrataj kostoj	150.00
Vojaĝx-kostoj	130.00
Informilo	110.00
GAJNO	<u>300.00</u>

SUMO 690.00
S-ro Bienen estas komisiita helpi al Klaus Hogen por klarigi la konton pri 1996.

Trilanda Renkontigxo en Akeno

- S-ro Moritz ne ricevis respondon de kontaktita antaŭvidita prelegonto. konsekvence:

- S-ro Delforge kontaktu S-ron Martens (prezidanto de la esperanto-grupo en Lille) kaj S-ron Dimitry (ankaŭ en Lille) por scii cxu ili kompetentas pri Islamo, cxu ili pretus veni en Akeno kontraŭ senpaga mangxado kaj 150 DM kiel repago de vojaĝxkostoj (cxio inkluzivita). Se ne: prelegantino el Akeno povus paroladi pri Islamo (ni devus traduki kaj poste okazu demandado...).

- Trude Sinno havas lumbildojn pri moskeoj kaj araban muzikon (S-ro Bienen informigxu pri la eblecoj disponi pri la taŭga aparataro).

- Ni acxetu la verkon "La nobla Korano" por gxin donaci al Bilal-moskeo (kosto: +/- 59 GM).

Trilanda Renkontigxo en Liegxo

- Dato: 28-an de septembro 1997

- Rendevuoloko: Centre provincial, rue Belvaux 189, Grivegne (Liegxo)

- Provizora programo:

Matene: bonvena kafo, laborkunsido, videoprojekciado pri "Liegxo hieraŭ kaj hodiaŭ"

Tagmangxo en la centro

Posttagmeze: piedvizito de la historia kvartalo de Liegxo.

- Prezo: decido kun la organizantoj en Liegxo - la komitato de *Senlime* proponas maksimume 40 DEM (cxion inkluzivitan - por membroj de *Senlime*).

- Aligxiloj: se S-ino Dupont ne pritraktos tiun problemon, S-ro Delforge avertos S-inon Sinno kiu siaflanke avertos Niko Hoen (tiu

lasta jam posedas kvazaŭ-pretan tekston cxe sia komputilo). La aligxiloj estu transdonitaj al la cxeestantoj en Akeno.

Kunordigado de la agadoj de la grupoj

Tempo mankis por pritrakti tiun punkton. Gxi estu traktata dum venonta laborkunsido.

Venonta kunsido:

La venonta kunsido okazos en la Natur-Centro en Botrange (B) la 8an de junio je la 11 horo.

Diversajxoj

- La 2an de marto 1997, estis malfondita de gxia Gxenerala Asembleo la asocio "Someraĵ Universitataj Kursoj" (SUK).

- S-ro Sossois gvidas esperanto-kurson en Charleroi (B), en sindikata medio: 20 lernantoj, inter kiuj la responsulo de la grupo: Joseph Lipolis. Oni antaŭvidas alian tian kurson en la regiono, sed mankas instruonto...

- La prezidanto de Skolta Esperanto-Movado en Belgio prilaboris elektran panelon pri esperanto (kompletigota per finajxo kiel "-as", ...). La prezo estus cxirkaŭ 7.000 BEF...

- Ponto Esperanto: la belga gazeto "Le Soir" publikigis artikolon pri la inaŭguro en Wandre (Liegxo) de "Ponto Esperanto" (teknikaj informoj: Stajita tipo, longo 450 m, alto de la meza pilono 85 m.). Kiu scias iom pli? Inaŭgurtago? Gazetartikolo? Foto? Respondu al Raymond Boré, Square Zamenhof 481, FR-73000 CHAMBERY (Francio).

- Reagoj pri nia estonta TLR: okazas io samtempe en Oostende (kion fari?) - S-ro Destabelle ne sxatas nian temon - k.t.p.!

La protokolinto,
J.-M. Jacques

E S enlime p e r a n t o

Celante plifortigi la interpopolan interkompreniĝon helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la Eùregiono Mozo-Rejno, **Senlime** klopodas publikigi agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eùregiono.

Ĝi **laùeble** enhavos la programojn de la lokaj grupoj. Tial tiuj-ĉi devus atingi min plej malfrue la 15an de la monatoj

- decembro por la N-ro 1
- marto por la N-ro 2
- junio por la N-ro 3
- **julio** por la N-ro 4.

Tiuj esperantistaj okazontaĵoj en Eùregiono Mozo-Rejno devos esti anoncitaj en esperanto aù en nacia lingvo kaj esperanto. Tiu-ĉi paĝo ankaù aperos ĉe la "Interreto" je la adreso:

<http://www.tornado.be/~jmjsenlime/>

Inf.: J.-M. JACQUES
(xx 32 87/33.02.92

Eùregiona kalendaro de

Ma. 01/04 - 20h00 - Hasselt (B)
Lumbildoj pri la Esperanto-kongreso en 1987 far' Marcel AERTS. Inf. Marcel AERTS:
(xx 32 11/253467.

Di. 06/04 ĝis Di. 13.04 - Vojaĝo sur Rejno-Mozelo. Inf. niaj geamikoj Peter PARREN kaj Jan HANSE:
(xx 31 4345/51436 kaj xx 31 4755/34325.

Ma. 16/04 - 19h30 - Eschweiler (D): Geografiaj kvizoj + S-roj Hogen kaj Langenbach parolos pri "Strangaj bibliotekoj". Inf. Wolfgang BIENEN:
(xx 49 241/62350..

Ve. 25/04 - 20h00 - Wjilre (NL): prelego de Simo MIJOLEVICX (temo ne konata). Inf. Trude SINNO:
(xx 31 4330/62015.

Di. 27/04 - 9h30 - Aachen (D) Trilanda renkontiĝo. Inf. Wolfgang BIENEN:
(xx 49 241/62350

Ma. 06/05 - 20h00 - Hasselt (B) Videobendo pri la Praga Esperanto-kongreso far' Jef GERAERTS. Inf. Marcel AERTS:
(xx 32 11/253467.

Me. 07/05 - 19h30 - Aachen (D): "Dostojevski - profeto de la 20a jarcento" (S-ro Langenbach) + Kvizo pri la historio de Rusio (S-ro Moritz). Inf. Wolfgang BIENEN:
(xx 49 241/62350.

Ma. 13/05 - 20 h. - Verviers (B) Assemblée Générale du groupe Ĝenerala Asembleo de la grupo Inf. J.-M. JACQUES:
(xx 32 87/33.02.92

Ve. 30/05 - 20h00 - Wjilre (NL): prelego de Antonio DE RUIJTER (temo ne konata). Inf. Trude SINNO:
(xx 31 4330/62015.

Me 04/06 - 19h30 - Aachen (D): S-ro Hogen hipnotigos ankaù vin + Ni tradukos el la revuo "El Popola Chinio" (S-ro Bienen). Inf: Wolfgang BIENEN:
(xx 49 241/62350.

Di. 08/06 - 10h00 - Botrange (B) - Première "journée de Senlime" (ou "journée sans frontière") au centre nature de Botrange.
- Unua "Senlima tago" en la natur-centro en Botrange. Inf. Trude SINNO:
(xx 31 4330 62015
Natur-centro en Botrange:
(xx 32 80/44.57.81

Ma. 10/06 - 20 h. - Verviers (B) Promenade botanique dans le parc Fabiola (rue Xhavée) Botanika promenado en la parko Fabiola (strato Xhavée). Inf. José JACOB:
(xx 32 87/22.10.79

!

Senlime ne responsas pri eventualaj program-aranĝoj: prefere telefonu ĉe la menciita persono antaù ol partopreni aktivaĵon.

Senlime

Diversaĵoj

Verviersa Esperanto Grupo

Kotizoj / Cotisations

Belgoj loĝantaj en Eùregiono povas ĝiri la subajn kotizojn al la konto n°

Les belges habitant l'Eurégio peuvent virer les cotisations suivantes au compte n°

000-0245571-64

de: Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

<i>Senlime</i>	370 BEF
APE 96/97	400 BEF
UEA 1997	1850 BEF

Senkulpiĝoj

La redaktoro senkulpiĝas pro la neklarigebla eraro farita sur la unua paĝo de la antaŭa numero: "nur tiu, kiu neniam laboras, neniam eraras".

Kiel kelkaj el vi rimarkis, la n-ro de la *Senlime*-konto en Belgio tie menciita estas neĝusta. Feliĉe, tiu numero rilatas al nenies konto kaj neniom da mono perdiĝis (la P.Ĉ.K. simple resendis la faritajn ĝirilojn)... Male, la nombro da kotizintaj membroj (en Belgio) kreskis kompare kun la antaŭa jaro!

Kompreneble, daŭre eblas pagi sian kotizon por 1997. Antaŭan dankon al ĉiuj!

Ekskomitataniĝo

Pro troa okupiteco, nia amiko Jan Bovendeerd sciigis al ni sian deziron ekŝi el la komitato de


Senlime. Tian deziron ni komprenas kaj respektas, sed bedaŭras.

Nun mankas al ni, ideale (kaj minimume!), du komitatanoj: reprezentanto de la Lieĝa grupo, kaj reprezentanto de belga Limburgo. Ĉu estus volontulo?

Supersignoj

Versxajne vi rimarkis ke, en **cx**-tiu numero, mi unuafoje uzis, laŭ la interreta kutimo, sinsekvon de du literoj **cx**, **gx**, **hx**,... anstataŭ la **cx**apeligitaj literoj **ĉ**, **ĝ**, **ĥ**,...

La kialo, kompreneble, estas la fakto, ke mi unue verkas la artikolojn por "Internet"... kie supersignoj malfacile trovas lokon: la litero x estas uzata **cx**ar **gx**i ne ekzistas en la esperanto-literaro, kaj tio (preskaŭ) ne modifas la alfabetajn ordigojn...



Verviersa Esperanto - Grupo

J.-M. Jacques, pl. Verte 23 bte 3
B-4800 VERVIERS

Senlime


Somero
1997

N-ro 3

Trilanda
Renkontiĝo
en Lieĝo
1997-09-28

Senlime

Oficiala informilo de la komitatanoj al la membraro de
Esperanto-Asocio en la Eŭregiono Mozo-Rejno



kaj

Verviersa Esperanto-Grupo

PERIODA^O
PERIODIQUE

Informations en **français** /

Informoj en la **franca**:

(xx-32-87-330292

: JMJacques@galaxycorp.com

J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,

B-4800 VERVIERS

Informatie in het **Nederlands** /

Informoj en la **nederlanda**:

(xx-31-4330-62015

T. Sinno, In 't Oord 45, NL-6291

VN VAALS

Informationen auf **deutsch** /

Informoj en la **germana**:

(xx-49-2403-64041

U. J. Moritz, Im Römerfeld 44,

D-52249 ESCHWEILER

Kotizo kaj abono al "Senlime"

Belgio 370 BEF

Konto n-ro: **000-0245571-64**

de **Esperanto-Grupo**, rue

Donckier 22, 4800 VERVIERS

Nederlanda 20 NLG

Konto n-ro: **5789437**

de **Marnoland-grupo** (hr. n.g.m.

Hoen), NL-6181 BG ELSLOO

Germanio 18 DEM

Konto n-ro: **663201** bankkodo

390 500 00 de **Senlime** (Monika

Hogen) Im Pesch 20, D-52134

HERZOGENRATH

La membro-kotizo koncernas la
civilan jaron kaj estas nepre
pagenda antaŭ la 31-a de januaro.
La paganto klare indiku la celon de
la pago, ekzemple: membro-kotizo
Senlime 1997 por S-ro XXXXXXXX.

Nur niaj (regule) kotizintaj
membroj ĝuas rabaton okaze de
Trilanda Renkontiĝo kaj abonon
al tiu-ĉi informilo.

Senlime, Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno,

kaj Eiège-Espéranto

INVITAS VIN AL

Trilanda Renkontiĝo en Lieĝo (Belgio)

dimanĉon, la 28-an de septembro 1997

KUNVENEJO: Centre Provincial de la Jeunesse et des Sports
Rue Belvaux 189 GRIVEGNEE (LIEGE)

ALIĜILO (deviga aliĝo kaj ĝiro: antaŭ la 15-a de septembro) kaj
INFORMOJ:

Denise Dupont,

Rue de Henne 16, B-4053 EMBOURG

Telefono 04/365.15.23

Programo

- 09.30 Malfermo de la kunvenejo kaj bonvena kafo
- 10.00 Ĝenerala asembleo de *Senlime* kaj informoj
- 11.00 Vidbendo pri «*Lieĝo hieraŭ kaj hodiaŭ*» (en esperanto)
- 12.30 Komuna tagmanĝo en la Provinca centro
- 14.00 Foriro per individuaj veturiloj al la parkejo St. Leonard
- 14.30 Pieda vizito de la historia kvartalo de Lieĝo:
! *Kunprenu pluvvestaĵojn kaze de malbona vetero* !
- Preĝejo kaj bapto-kuvoj St Barthelemy
- Muzeo de Asemburg
- Kvartalo «Ekster Kastelo»
- Monto de Bueren
- Korto de la Princepiskopa Palaco
- Urbo-domo.
- 17.00 - Alveno sur la placeto antaŭ la muzeo St. Georges
interbabilado ĉe kafo kaj peco da torto en la tiea
«**Taverne des musées**» [taverno de la muzeoj]
- 18.00 Adiaŭo kaj foriro.

Mapo de Liegxo

Mapo de Liegxo

Kiel pagi ?

- 800 BEF
aŭ 640 BEF pro rabato
al la konto 000-0245571-64 de
Esperanto-Grupo,
rue Donckier 22,
4800 VERVIERS
- 45 NLG
aŭ 36 NLG pro rabato
al la konto 5789437 de
Marnoland-Grupo
(S-ro N. Hoen)
NL-6181 BG ELSLOO
- 40 DEM
aŭ 32 DEM pro rabato
al la konto de *Senlime*,
Aachen: 6623201,
Sparkasse Aachen
(BLZ 390 500 00).

Deviga aliĝo kaj ĝiro
antaŭ la 15-a de septembro

Informas: Denise **DUPONT**

Kiel atingi nin ?**AUTOMOBILE**

Konsultu la mapon.

RIMARKOJ:

Oni ne rajtas parki en la korto de la Centro. Do, vi devas serĉi lokon sur la strato Belvaux aŭ sur la apudaj stratetoj.

Posttagmeze, oni kune veturos ĝis la parkejo St. LEONARD.

!
ONI NE REVENOS EN
GRIVEGNEE

TRAJNE

Antaŭ la stacidomo elektu buson 1-4-40, direkto «CENTRE». Malsupreniru je la haltejo «Théâtre Royal» [Reĝa Teatro].

Trairu kaj direktu vin al «Place de la République Française» [Placo de la Franca Respubliko]. Tie prunteprenu buson 29 aŭ 33. Jen la horaro por dimanĉo matene:

n° 29 n° 33

	08,23
08,38	
09,06	09,22
09,38	
10,10	10,24

Demandu la haltejon «Falchena» [Fal+ena].
Vi estos ĝuste antaŭ la Centro.

Vi rajtas aĉeti buskarton je la giĉeto de la stacidomo (210 F. por 8 vojaĝoj).

Ankaŭ troviĝas taksioj antaŭ la stacidomo.

La personoj kiuj dezirus **ne** partopreni la piedradon tra la historia kvartalo aŭ eventuale mallongigi tiun-ĉi, povos tre facile iri al la rendevu-loko: la «Taverne des Musées», llot [Insuleto] St. Georges, ĝuste antaŭ la samnoma muzeo... kaj atendi nin antaŭ bongusta belga biero aŭ bonodora taso da kafo.

Denise **DUPONT**

Le Groupe Espérantiste de Verviers a tenu son assemblée générale annuelle... avec le "succès" habituel!

Il a donc été décidé de suspendre pendant une année scolaire (au moins) le traditionnel cycle de conférences, mais le groupe ne sera pas dissout... histoire de "préservier l'outil de travail" en prévision de jours meilleurs (qui sait: peut-être après le "choc" de l'an 2.000...).

Les autres activités (cours, site "Internet", jumelage avec Bradford et Arles, etc...) seront maintenues.

Nous invitons cordialement tous nos membres à participer désormais aux réunions et activités de *Senlime* et du groupe de Liège (Liège-Espéranto).

Verviersa angulo

<http://www.galaxycorp.com/JMJacques>

Verviersa
Esperanto-Grupo

Kotizoj / Cotisations

Belgoj loĝantaj en Eŭregiono povas ĝiri la subajn kotizojn al la konto n°

Les belges habitant l'Eurégio peuvent virer les cotisations suivantes au compte n°

000-0245571-64
de: Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

<i>Senlime</i>	370 BEF
APE 96/97	400 BEF
UEA 1997	1850 BEF

Aŭtuno
1997

(4)

oktobro
novembro
decembro

Senlime

Oficiala informilo de la komitatanoj al la membraro de
Esperanto-Asocio en la Eŭregiono Mozo-Rejno



kaj

Verviersa Esperanto - Grupo

PERIODA^O
PERIODIQUE

Informations en **français** /
Informoj en la **franca**:
(xx-32-87-330292
: JMJacques@galaxycorp.com
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,
B-4800 VERVIERS

Informatie in het **Nederlands** /
Informoj en la **nederlanda**:
(xx-31-4330-62015
: sinno@ibac.rwth-aachen.de
T. Sinno, In 't Oord 45,
NL-6291 VN VAALS

Informationen auf **deutsch** /
Informoj en la **germana**:
(xx-49-2403-66888
fax.xx-49-2403-64041
U. J. Moritz, Im Römerfeld 44,
D-52249 ESCHWEILER

Kotizo kaj abono al "Senlime"

Belgio 370 BEF

Konto n-ro: **000-0245571-64** de
Esperanto-Grupo, r. Donckier 22,
B-4800 VERVIERS

Nederlanda 20 NLG

Konto n-ro: **5789437**
de **Marnoland-grupo** (hr. n.g.m.
Hoen), NL-6181 BG ELSLOO

Germanio 18 DEM

Konto n-ro: **663201**
bankkodo **390 500 00** de **Senlime**
(Monika Hogen), Im Pesch 20,
D-52134 HERZOGENRATH

Senlime, Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno,

kaj belga **A**socio **P**or **E**speranto

INVITAS VIN AL DU-TAGA

Trilanda Renkontiĝo en Dinant (Belgio)
sabaton, la 27an kaj dimanĉon, la 28an de junio 1998.

ALIĜILO kaj INFORMOJ:

Marcel **Delforge**,
Rue des Glacières 16, B-6001 MARCINELLE
(XX-32-(0)71/43.14.13

Provizora programo

Sabato *posttagmeze:*

rendevuo ĉe la en+ipiĝejo por promenado sur Mozo
komuna vespermanĝo

vespere:

kultura kaj/aŭ distra vespero.

Tranoktado malmultekosta eblas en farmbieno apud Dinant.

Dimanĉo *matene:*

vizito de la citadelo en Dinant
oficiala akcepto en la urbo-domo

posttagmeze:

ĝenerala asembleo de la asocio "Senlime"
rehejmeniro ĉirkaŭ la 15a horo.

ANTAŬVIDEBLA PREZO: proksimume 1.800 BEF
dutaga renkontiĝo = duobla prezo, sed ni antaŭvidos minimuman
(bazan) prezon + eventualajn komplementojn (kun la kutima
rabato por membroj, junuloj, k.t.p....).

Nur niaj (regule) kotizintaj
membroj ĝuas rabaton okaze
de Trilanda Renkontiĝo kaj
abonon al tiu-ĉi informilo.


La membro-kotizo koncernas la civilan jaron kaj estas
nepre pagenda antaŭ la 31-a de januaro. La paganto
klare indiku la celon de la pago, *ekzemple:*

membro-kotizo Senlime 1997 por S-ro XXXXXXXX.

La komitato de *Senlime*,
kunveninta la 23an de
aŭgusto 1997 en Vaals,
proponis renovigitan
internan regularon
de la asocio

Senlime

*Esperanto-Asocio
en la Eŭregiono
Mozo-Rejno*



Verviers, la 3an de marto 1997

INTERNA REGULARO

PRI KOMITAT-KUNVENOJ

ART. 1. - La komitato jare organizas minimume du "Trilandajn Renkontiĝojn": printempe kaj aŭtune.

Ĝi principe kunvenas pli-malpli ses semajnojn antaŭ kaj post ĉiu trilanda renkontiĝo.

ART. 2. - Ĉiu komitatano, kiu ne povos partopreni komitat-kunvenon, antaŭe informu la gastiganton pri tio kaj konigu sian opinion pri la tagordaj punktoj.

ART. 3. - Komitatanoj kiuj senkaŭze ne partoprenas en la komitataj kunsidoj ne estos proponitaj kiel novaj komitatanoj dum la sekvonta Ĝenerala Asembleo.

ART. 4. - Ĉiu komitat-kunveno finiĝas per elekto de la loko, provizora tagordo kaj dato de la sekvonta kunsido.

ART. 5. - Komitatano protokolu pri la decidoj de ĉiu komitata kunveno. La protokolon ĝi, kiel eble plej rapide, sendu al ĉiu komitatano senescepte, kun la oficiala invito nepre partopreni la sekvontan kunvenon.

ART. 6. - Ĉiu komitatano reprezentu kaj informu sian lokan grupon ĉe/pri la komitato, kaj inverse.

PRI FINANCOJ

ART. 7. - La asocio disponu pri unu konto en financa instituto de ĉiu el la trilandoj. Tiu konto ricevu la

kotizojn kaj aliajn pagojn.

ART. 8. - Neniu rajtas konservi asocian monon en iu ajn kaso. Ĉiu monsumo estu kiel eble plej rapide sendita al unu el la tri kontoj de la asocio, kun detalaj klarigoj.

ART. 9. - Membro ĉiam pagu sian kotizon antaŭ la 31a de januaro al sia landa konto, kun klara mencio de sia nomo kaj de la kotiz-jaro.

ART. 10. - Komence de februaro, listo de pagintaj membroj estu sendita de ĉiu landa kasisto al la centra kasisto.

ART. 11. - Plej malfrue fine de februaro la centra kasisto sendu individuan leteron al la antaŭaj membroj, kiuj ne repagis sian kotizon. Ĝi ankaŭ sendu liston de la pagintaj membroj al

- la reponsulo pri informado de membroj
- la responsulo pri la adresaro
- la organizontoj de la sekvontaj 2 TLR'oj.

ART. 12. - Landaj kasistoj kaj personoj, kiuj enaŭ elspezis monon nome de la asocio detale raportu al la centra kasisto-kontregistro plej malfrue

- tri semajnojn post trilanda renkontiĝo aŭ alia aranĝo (por ebligi kontrolon de la pagoj kaj provizoran kalkulon de la rezulto);
- la 15-an de decembro (por ebligi starigon de la kontoj kaj buĝeto de la asocio).

ART. 13. - La centra kasisto, post kontrolo de la raportoj faritaj laŭ la art. 12,

donos la necesajn (re) pagpermesojn al la landaj kasistoj.

ART. 14. - Jarfine aŭ post ĉiu grava aranĝo, la centra kasisto kiel eble plej rapide preparu (provizorajn) kontojn. La kontoj estu prezentitaj al la komitatanoj dum la sekvanta kunsido kaj laŭstatute kontrolitaj kaj aprobitaj.

PRI ARANĜOJ

ART. 15. - La komitato organizas, kaj trilandajn renkontiĝojn, kaj eventuale diversajn esperanto-aranĝojn, en la Eŭregiono Mozo-Rejno, kunlabore kun volontuloj, membroj de la asocio aŭ ne. Ĝi subtenas specialajn aranĝojn kadre de la lokaj grupversperoj.

ART. 16. - La komitato

kunlaboras en esperanto-aranĝo nur post aprobo de projekto prezentita al ĝi de loka organizanto. Krom en kazo de eksterordinara aranĝo, tiu projekto estu prezentita minimume naŭ monatojn antaŭe.

ART. 17. - Ses monatojn (aŭ, se ne eblas, kiel eble plej frue) antaŭ ĉiu aranĝo, komitatano anoncu tion al esperanto-gazetoj.

ART. 18. - Minimume 5 semajnojn antaŭ la aranĝo, loka organizanto sendu la aliĝilojn al la interesiĝantaro (membroj kaj homoj kiuj partoprenis al TLR dum la du antaŭaj jaroj) kaj al la landaj kasistoj (kun precizigo de la kotizoj kaj veraj kostoj).

ART. 19. - Du semajnojn antaŭ la aranĝo, komitatanoj

anoncu tion al nacilingvaj gazetoj.

PRI STATUTAJ TASKOJ

ART. 20. - Ĉiu komitatano plenumu konstantajn aŭ provizorajn taskojn kune difinitajn konforme al la artikolo 10 de la statuto.

ART. 21. - Ĉiu komitatano rajtas agi nome de la komitato, ĉu sekve de difinita mandato, ĉu proprainiciate (pro grava kialo aŭ urĝo). Raporto estu tuj farita al la aliaj komitatanoj.

ART. 22. - Ĝenerala sekretario arigu la informojn kaj, kalkulinte pri la urĝo, la kostoj kaj aliaj kondiĉoj, kiel eble plej rapide transdonu la ricevajn informojn al la aliaj komitatanoj.

Pri Internet

<http://www.galaxycorp.com/JMJacques>

Dum miaj (ve, tro mallongaj) ferioj, mi dediĉis multajn horojn por plibonigi la TTT-ejon de nia asocio ĉe la Interreto.

La enkonduka paĝo nun aspektas multe pli profesia: turniĝanta terĝlobo altiran vian atenton sur fono de stelplena galaksio... kie surprize aŭdeblas la muziko "Tiel parolis Zarahustra", de Richard Strauss (temo de la fama filmo "2001, Spaca Odiseo").

La nombro da paĝoj preskaŭ triobligis: la ejo nun estas kvin-lingva (eĉ la angla lingvo uzeblas).

Troveblas ĉe tiu TTT-ejo diversaj informoj pri

esperanto, pri Senlime (statutoj, komitato, membraro, kontoj, informilo, aniĝilo,...) kaj aliaj esperanto-asocioj, esperanto-kurso por IBM-kongrua komputilo, k.t.p.

Krome diversaj "ligiloj" kondukos vin al aliaj TTT-ejoj, inkluzive de tiuj de la liceo en Plombimonto (kies lernejestro mi estis) kaj tiu de Verviers (ĉu necesas ripeti, ke ni tradukis en esperanton diversajn turismajn bro+urojn pri Verviers?).

Mi petas vin viziti tiun ejon, kiu certe plaĉos al vi, sed kiu ankaŭ ver+ajne ion novan lernigos al vi pri nia asocio kaj ties agad-programo.

J.- M. Jacques

Protokolo pri la kunsido
de la estra komitato
la 23-an de aŭgusto 1997
en Vaals
(14-a ĝis 17,30-a horo).

Cxeestis: S-roj Wolfgang BIENEN,
Marcel DELFORGE, Claus
HOGEN, Jean-Marie JACQUES,
Uwe Joachim MORITZ, S-inoj
Trude SINNO kaj Anne-Liese
SOUREN.

Senkulpigxis: S-roj Jan
BOVENDEERD kaj Heinrich
LENTZEN.

Prezidis: Uwe Joachim MORITZ.

**Trilanda Renkontigxo en
Liegxo**

M. Delforge zorgos ke restantaj ekzempleroj de "Inter ni" (kun la tekstoj pri la vizito de Liegxo) estu senpage disdonitaj al la aligxintoj en Liegxo.

Pri la gxenerala asembleo:

- J.-M. Jacques protokolos.
- T. Sinno faros la gxeneralan raporton (pro malcxeesto de U.-J. Moritz).
- Provizora informado pri Dinant.
- C. Hogen prezentos bugxeton por 1998.
- La membroj decidu pri la dauro de komitatana mandato (vocxdono okazus dum la sekvanta TLR en Dinant).
- Rememorigi la gxustan manieron anigxi (nomo, adreso, k.t.p.) kaj pagi sian kotizon (nomo + jaro).

**Donaco al Pakistanoj
kunlaborintaj en Akeno**

T. Sinno komuniku al C. Hogen

la UEA-kodon de Pakistana Eo-Asocio.

C. Hogen tuj gxiru 50 \$ tra UEA-konto en Kolonjo (subteno de eldono al Cxinio).

**Trilanda Renkontigxo en
Dinant**

La projekto prezentita de M. Delforge lau informoj de S-ro Wouters gxenerale placxas kaj, post pridetalaj diskutoj, definitiva projekto (vidu pagxon 1an) estas ellaborita, kun jenaj rimarkoj:

- logxado estu kiel eble plej malmultekosta, sed mankas detaloj pri tio (cxu kuranta akvo, necesejoj, k.t.p.),
- nepre necesas varma tagmangxo,
- vizito de la citadelo ne dauru pli ol unu horon,
- la profito (au perdo) estos dividita inter APE kaj *Senlime*.

Kunlaboro inter komitatoj

La diversaj informoj (cxefe listoj de partoprenintoj en TLR, kotiz-pagintoj, nov-aligxintoj, k.t.p.) nepre devas kiel eble plej rapide esti transdonitaj al la koncernitaj komitatoj.

Noto de la redaktanto [N.d.l.r.]: tiucele ni uzu kiel eble plej modernan sistemon (komputila disketo prefere ol papero, interreto prefere ol disketo, k.t.p.) - la lasta membro-listo, la listo de partoprenintoj en la lastaj TLR kaj nian konton cxe Verviersa Esperanto-Grupo estas nun haveblaj (nur por legado!) che la TTT-ejo de *Senlime*.

C. Hogen informigxu cxe UEA pri la ebleco malfermi konton por *Senlime* cxe UEA, kaj cxefe

pro la eblecoj plej rapide ricevi kont-eltiron (ekz-e kaze de aligxoj al TLR).

Interna regularo

Nova projekto jam de longe preparita de J.-M. Jacques kaj resumanta multajn antaŭajn komitatajn pridiskutojn estas unuanime aprobita (krom detalaj korektoj: vidu la kompletan tekston sur pagxo 2). Gravas por la bona efiko de niaj laboroj ke tiuj reguloj estu memortenitaj kaj ne plu konstante rediskutotaj.

Kunordigado inter la grupoj

La propono de M. Schrymecker, ke komitataj kunvenoj de *Senlime* kaj Zamenhof-festo regule okazu en Kelmis (pro iama Neutrala Moresnet, k.t.p.) estos probita okaze de la venonta laborkunsido.

T. Sinno preparis bonan projekton pri enketilo koncernanta la TLR: gxi estas enhance aprobita, kun teknikaj sugestoj (anstataŭi respondojn per krucumado kiam eblas, k.t.p.). La modifita enketilo estu disdonita al la cxeestantoj en Liegxo, kun peto redoni gxin tuj (au plej malfrue antaŭ donita dato).

Sekvonta laborkunsido

La venonta kunsido okazos la 2an de novembro en Kelmis (Select), je la 14a horo.

(daŭrigo sur pagxo 6)

E S enlime p e r a n t o

Celante plifortigi la interpopolan interkompreniĝon, helpe de la internacia lignvo esperanto, precipe en la Eùregiono Mozo-Rejno, **Senlime** publikigas, por siaj kotizintaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eùregiono. Ĝi enhavas la programon de la lokaj grupoj.

La kontregista jaro de *Senlime*, komenciĝas la 1an de januaro kaj finiĝas la 31an de decembro. Do, kotizo pagita ekz-e la 10an de novembro 97 valoras nur por la jaro 1997!

Rappel / rememorigo:
Paĝoj / Pages **E.G.V.-Senlime**
ĉe / sur **Internet:** <http://www.tornado.be/~jmjsenlime/>

Inf.: J.-M. JACQUES
(xx 32 87/33.02.92
: jmjsenlime@tornado.be

Eùregiona kalendaro 1997/98 (2)

Me. 01/10 - 19h30 - Aachen (D)
Programo ne komunikigita
Programme non communiqué
Inf.: Wolfgang BIENEN
(xx 49 241/62350

Ma. 07/10 - Liège (B)
prelego de / conférence de
Claude PIERROUX:
"Memoroj pri vojaĝoj"
"Souvenirs de voyages"
Inf.: Denise DUPONT
(xx 32 (0)4/365.15.23

Sa. 11/10 - Charleroi (B)
Ĝenerala asembleo de A.P.E.
Assemblée générale de A.P.E.
Inf.: Marcel DELFORGE
(xx 32 (0)71/43.14.13

Ve. 31/10 - 20h00 - Wijnre (NL)
Programo ne komunikigita
Programme non communiqué
Inf.: Trude SINNO
(xx 31 4330 62015

Me. 05/11 - 19h30 - Aachen (D)
Programo ne komunikigita
Programme non communiqué
Inf.: Wolfgang BIENEN
(xx 49 241/62350

Ve. 28/11 - 20h00 - Wijnre (NL)
Programo ne komunikigita
Programme non communiqué
Inf.: Trude SINNO
(xx 31 4330 62015

Me. 03/12 - 19h30 - Aachen (D)

Programo ne komunikigita
Programme non communiqué
Inf.: Wolfgang BIENEN
(xx 49 241/62350

Ma. 09/12 - 20 h. - Verviers (B)
Enregistrement de messages
de Noël à Bradford et Arles
Surbendigo de kristnaskaj
mesaĝoj al Bradford kaj Arles
Inf.: J.-M. JACQUES
(xx 32 87/33.02.92

Di. 14/12 - 20h00 - Wijnre (NL)
Programo ne komunikigita
Programme non communiqué
Inf.: Trude SINNO
(xx 31 4330 62015

Ma. 13/01 - 20 h. - Verviers (B)
Audition du message de Noël
du groupe de Bradford
Aŭskultado de la Kristnaska
mesaĝo el la Bradforda grupo
Inf.: J.-M. JACQUES
(xx 32 87/33.02.92

!

Senlime kaj **V.E.G.** ne responsas pri eventualaj program-+anĝoj: prefere telefonu ĉe la menciita persono antaŭ ol partopreni aktivajon.

Senlime et **V.E.G.** ne sont pas responsables d'éventuels changements de programme. De préférence, téléphonez à la personne indiquée avant de participer à une activité.

(*daŭrigo de p. 4*)

Trude Sinno sendos konfirmon kaj provizoran tagordon al cxiuj komitatanoj kaj invitotoj.

Diversajxoj:

1. T. Sinno atentigas pri la laboro de J.-M. Jacques por plibonigi kaj gxisdatigi la TTT-ejon de *Senlime*.

2. W. Bienen denove petas, ke oni eventuale uzu mallongigojn de komitatanaj nomoj nur post unuan uzon de la kompleta nomo, kun mallongigoj parenteze klarigitaj.

3. Eblus ricevi monsubvenciojn de Euregiono, sed niaj fortoj nuntempe ne sufixas.

4. C. Hogen informigxis cxe la kastelo en Hertzogenrath, kie estas ebleco ekzpozicii pri esperanto, sed problemo pri kosto: ni nenion pagu!

5. T. Sinno rememorigas pri Verviersa Sabato " VIF ", la 9an de agosto (n.d.l.r.: al kiu partoprenis 3500 homoj, sed nur 3 esperantistoj), kaj montras la esperantlingvan broxsureton 16-pagxan pri Verviers (haveblan cxe la Turism-oficejo, str. Xhavee 11, B-4800 VERVIERS).

6. U.J. Moritz transprenas la taskon de C. Hogen raporti al esperanto-gazetoj pri TLR, k.t.p. Pro lia malcxesto en Liegx, alia komitatano bonvolu raporti pri tio (en esperanto).

7. Ni denove konstatas kolizion inter TLR en Liegx kaj alia TLR en Oostendo: gxustatempe

konsultu kalendaro(j)n de esperanto-arangxoj (Eventoj,...).

8. Zamenhofan feston ni eventuale organizos en Kelmis.

9. T. Sinno denove klopodos organizi TLR-on en Vaals kaj Trilanda punkto en septembro au oktobro 1998.

La protokolinto,

J.- M. Jacques

100 jaroj da propagando por esperanto en Belgio

Cxu vi sciis, ke la unua propagando por esperanto en Belgio okazis en Bruselo, en decembro 1897, sekvota de kurso tie en januaro 1898 ?

Lernantoj de tiu kurso poste instruis en Gilly (marto 1898) kaj en Spa (aprilo 1898). La tiea instruanto estis Ch. Hault. Sxajne aperis artikolo de Rane Gyrène en " Le Soir " kaj de de Beaufront en " L'Esperantiste ".

La Verviersa Esperanto Grupo intencas organizi "ion" (afixoj, prelego, kurso,...) en Spa por festi tiun 100-an datrevenon.

Interesa afero (por esperantistoj kaj cxefe instruistoj / instruantoj) certe estus vizito de la lingva lernejo " Ceran " (Nivezé-Spa). Legu cxi-apude kion gazetoj opinias pri tiu privata lernejo kaj ties instru-sistemo...

"Le succès est rapide sinon

immédiat. Dû notamment aux facultés d'adaptation du CERAN, qui n'hésite pas à conformer ses programmes à des demandes spécifiques. Celle de ce Parisien, par exemple, qui voulait améliorer son argot. Ou celle de Siemens dont 30 ingénieurs allemands sont venus tester sur les professeurs du centre la formation qu'ils allaient donner, en français, à leur personnel algérien. (...) Ce qui était au départ une école est devenu une véritable entreprise. Qui emploie aujourd'hui une centaine de personnes."

John Erler,

LA LIBRE BELGIQUE, Mai 1989

"Cosmeticagigant L'Oreal heeft De Jong voor een week naar het Belgische Spa gestuurd om zijn Frans bij te spijkeren. (...) Het gerenommeerde instituut huist een enkele indrukwekkende kasteeltjes op de groene heuvels rond Spa. Managers kunnen zich hier in alle rust, en voorzien van alle gemakken, het zweet langs de slapen laten lopen. (...) Want vanaf het moment dat the manager het kasteel binnenloopt, wordt op straffe van een gedeukt imago slechts één taal gesproken: Frans."

Geerhard Bolte,

MANAGEMENT TEAM, Oktober 1992

"Das Geheimnis der Belgier: Qualität und Intensität. Erstklassige Lehrer, Betreuung rund um die Uhr und eine ausgeklügelte Didaktik. Jeder Schüler kann wählen, ob er Grammatik, Aussprache, Sprach- oder Hörvermögen oder gar alles in ein oder zwei Wochen auf Vordermann bringen will. Chemie-Multi Henkel läßt jährlich etwa 20 Führungskräfte in Belgien schleifen. Dort treffen sie auf Deutchbänker und andere Kollegen mit erster Adresse. Größter deutscher Kunde: das Auswärtige Amt. Rund 200 AA-Mitarbeiter pilgern, so Chefausbilder Rohrbach, jährlich nach Spa."

Hans-Peter Canibol,

FOCUS, 1994